## ĈAPITRO V

### ALICIO RICEVAS ADMONON DE LA RAŬPO

TRE longan tempon Alicio kaj la Raŭpo silente rigardis unu la alian; fine la Raŭpo elprenis la pipon el la buŝo kaj alparolis ŝin per malvigla dormema voĉo:

"Kiu *vi* estas?" ĝi diris.

Jen ne tre kuraĝiga komenco! Alicio respondis malsinfide:

"Apenaŭ mi scias, Sinjoro, en la nuna momento. Mi bone scias kiu mi est*is*, kiam mi leviĝis hodiaŭ matene, sed mi kredas ke mi ŝanĝiĝis multfoje dum la tago."

"Kion vi volas kredigi per tio?" diris tre severe la Raŭpo. "Klarigu vin."

"Bedaŭrinde, Sinjoro, mi ne povas klarigi *min*" diris Alicio, "ĉar mi ja ne estas mi mem."

— "Ne komprenas," diris la Raŭpo.

"Tamen mi ne povas igi ĝin pli klara," Alicio tre ĝentile respondis, "ĉar mi mem ne komprenas. Kaj, ke la korpalteco ofte malsamiĝas dum la daŭro de unu tago estas tre konfuzige."





— "*Ne* estas," diris la Raŭpo.

"Nu, eble vi ne ankoraŭ spertis ĝin," diris Alicio, "sed kiam vi devas ŝanĝiĝi en krizalidon —tio ja nepre okazos ian tagon—kaj poste en papilion, vi sentos vin *iom* konfuzata, ĉu ne?"

"Tute *ne*," diris la Raŭpo.

"Nu, kredeble viaj sentoj ne similas la miajn," diris Alicio, "tamen tio estus certe tre konfuziga por *mi*!"

"Vi!" diris la Raŭpo malestime, "kiu *vi* estas?"

Tio ja rekondukis ilin al la komenciĝo. Alicio, sentante sin ĝenata per la tre mallongaj diroj de la Raŭpo, tenadis sin iom fiere, kaj diris tre serioze, "Laŭ mia opinio, vi devas unue diri al mi, kiu *vi* estas."

"Kial"? diris la Raŭpo.

Jen alia konfuziga demando! Ĉar ŝi ne povis elpensi ian kialon, kaj ĉar la Raŭpo ŝajnis esti malagrablulo, Alicio ekforiris.

La Raŭpo laŭte kriis post ŝi. "Revenu! mi havas por vi gravan konsilon."

Tio sonis al ŝi bonpromesa: ŝi do revenis.

"*Ne koleriĝu*," diris la Raŭpo, kaj tuj silentis.

"Ĉu nenion plu?" diris Alicio, subpremante kiel eble plej bone sian koleron.

"Jes," diris la Raŭpo.

Ĉar ŝi havis nenion alian por fari kaj ĉar